

E Ŭ R O P A B U L T E N O

Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

n-ro 12

10-an de marto 2001

Redaktas:

Umberto Broccatelli -

Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio

u.broccatelli@iscalinet.it

-u.broccatelli@libero.it

tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:

Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@mxs.nl

UEA-konto de EEU: **eece-p**

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio* (**EEU-informilo**) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eŭropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@iscalinet.it*; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento



Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo”
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante “simpatianto de EEU”, per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 eŭroj jare al la UEA-konto **eece-p**
TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

E E U - I N F O R M I L O

Respondo de la Prezidantino de la E.P.

S-ro Dante Chierico, konsiliano de Itala E-Federacio, sekve de ret-mesaĝo de li sendita al la Prezidantino de la Eŭropa Parlamento, s-ino Nicole FONTAINE, ricevis la jenan respondon, kiu ŝajnas al ni atentinda

«Mi dankas Vin pro via ret-mesaĝo de la 2a de oktobro, per kiu vi bonvolis submeti al la atento de la Eŭropa Parlamento viajn rimarkojn pri la lingva reĝimo de EP, en la perspektivo de ĝia plilarĝiĝo.

La Parlamento ĉiam subtenis la principon de egalrajteco inter la oficialaj lingvoj de la komunumaj institucioj kaj antaŭ nelonge, dum seminario pri multlingvismo okazinta en Bruselo la 30an de majo 2001, la Prezidantino de EP, Nicole FONTAINE reemfazis la neceson eviti fordrivadon al situacio de reduktisma hegemonio, en kiu unu, du aŭ tri lingvoj havas superregan pozicion. Por la momento la Administracio de la Parlamento estas studanta serion de proponoj celantaj kunagordigi funkcikapablon de la lingva reĝimo kaj respekton al la lingva kaj kultura diverseco.

Rilate al via propono pri pontlingvo ”neŭtrala kaj ne nacia”, mi povas sciigi al Vi, ke la eŭropa Komisiono petis al la komuna Servo “Interpretado-konferencoj” de la institucioj kaj organoj de la Eŭropa Unio (SCIC) ekestigi laborgrupon taskitan ekzameni la projektojn rilatajn al lernado de Esperanto kaj la mezuron en kiu ĝi povas esti utiligata kiel intera lingvo por interpretado.

Bonvolu ricevi miajn plej altestimajn salutojn,

Jean-Louis A. COUGNON

Chef de division - Courrier du Citoyen - Head of division -Correspondence with the citizen»

Tiu ĉi respondo ŝajnas iel pozitiva. Nun estas necese atingi ke en la aludita komisiono ĉeestu ankaŭ spertulo pri esperanto.

* * *

RAPORTO
pri la kunveno de laborgrupo “homaj rajtoj”
en Strasburgo kadre de Konsilio de Eŭropo, 2001-09-25.
de Hans Erasmus

Kunveno

De la 25a ĝis la 27a de septembro 2001 mi partoprenis en kunvenoj de kelkaj laborgrupoj kadre de Neregistaraj Organizoj (NRO-j) kiuj havas oficialajn kaj konsultajn rilatojn kun Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj kunvenis en Strasburgo, Francio.

Kutime la laborgrupoj kunvenas kiam la parlamenta asembleo de KdE (43 landoj) havas sian kunvenon. Nun la asembleo grandparte diskutis pri terorismo.

La tagordo de NRO-laborgrupo “homaj rajtoj” entenis i.a. la temon:

Oficialaj lingvoj, lingvoj de malplimulto, la lingvoproblemo kaj homaj rajtoj (propono de Hans Erasmus, UEA kaj aliaj)

Sub tiu ĉi titolo mi preparis mallongan kontribuon en kunlaboro kun “Federal Union of European Nationalities” (FUEN) kaj “European Bureau for Lesser Used Languages/Bureau Européen pour les langues moins répandues” (EBLUL). La dokumento estis aldonita kiel anekso al la tagordo de la grupo “homaj rajtoj” la 25-an de septembro. Dum la kunveno mi klarigis la proponon surbaze de aparta dokumento kiun mi ankaŭ disvastigis inter la partoprenantoj.

1 - Baza ideo

La baza ideo de nia kontribuo konsistas en propono starigi laborgrupon kadre de tiu “laborgrupo de NRO-oj pri homaj rajtoj” kadre de KdE. Tiu grupo pritraktu la kernemon: ĉu la nuna situacio kun oficialaj lingvoj en diversaj institucioj [6 oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN), 2 de KdE (angla kaj franca), 11 en Eŭropa Unio (EU)] ne havas malbonan efikon? Oni enkondukis kategoriojn aŭ gradojn de lingvoj (oficialaj lingvoj, aliaj lingvoj, lingvoj de malplimulto) kaj kreis tiel multajn handikapojn kaj ĝenon ĉe homoj kiuj ne (perfekte) regas ilin. Tamen ili devas uzi tiujn oficialajn lingvojn. Ĉu tiu situacio kongruas kun la deklaro pri homaj rajtoj kaj pli precize kun la Konvencio pri homaj rajtoj de KdE 1950? La efiko estas aŭ estos ke tiaj lingvoklasoj kreas la normon. Ĉu tiuj formalaj kaj neformalaj reglamentoj pri lingvoj en internaciaj organizaĵoj kaj ties efiko (la menciitaj handikapo, neeblecoj ricevi dokumentojn en propra lingvo ktp.) kongruas kun tiu baza internacia regularo de “Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj”? Ĝi en artikolo 2 diras: “*Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen ia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato*”.

Samspecan regularon oni trovas en Konvencio pri Homaj Rajtoj de KdE (art. 14) 1950 kaj en la nova Ĉarto de Eŭropa Unio (art.21).

Politika kaj jura problemo

Estas politika kaj jura problemo. Politike, ĉar politikistoj akceptis tiun situacion, eventuale protestis aŭ daŭre protestas aŭ malakceptis. Ankoraŭ ne ekzistas definitiva solvo en EU. Nur kreskas iu “solvo”, konsistanta el pli kaj pli granda limigo de eblecoj uzi sian propran lingvon kadre de EU-institucioj. Ŝajnas ke la politikistoj preferas ne tuŝi tian problemon kaj ili atendas la disvolviĝon.

La jura demando estas ĉu tiu situacio kongruas kun la menciitaj artikoloj en internaciaj regularoj. Diskriminacio laŭ raso aŭ religio ne estas permesata, sed kial ni akceptas tiun “diskriminacion” laŭ lingvoj? Pro praktikaj kialoj, multaj diros. Aliaj diros: estas la dominantaj landoj (lingvoj) kiuj altrudis al ni tiun situacion. Kaj pro la fakto ke ni akceptis tiun situacion intence aŭ silente.

Ne ekzistas multe da jurisprudenco pri tiu lasta temo. Ni volas esplori ĉu ne ekzistas malobeco. Eble ne formale ĉar ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj akceptis tiun situacion formale aŭ ne formale. Tamen kiun efikon havas tiu situacio? (ni produktu multajn ekzemplojn de negativaj konsekvencoj). Ĉu ne ekzistas misproportio? (konata kriterio en Eŭropa Unio).

2 - Dokumento

La NRO-laborgrupo pri “homaj rajtoj” de KdE akceptis nian proponon kompili studon pri tiu problemaro. Provizore ni proponas la sekvan enhavon:

E n h a v o

Enkonduko (kial tia studo/priskribo de la problemo)

Formulado de precizaj demandoj

Ekzemploj de multaj malbonaj efikoj de la hodiaŭa lingvo-politiko (ankaŭ ne formala lingvo-politiko estas

lingvo-politiko)

Jura opinio pri tiuj precizaj demandoj aŭ pri la nuna situacio kadre de artikolo 14 de la Konvencio pri Homaj Rajtoj de KdE.

Kiujn sekvojn havos la esploro, se oni konstatas malobeon aŭ malkongruon?

P r o c e d o

Starigo de malgranda teamo de iniciatantoj (EBLUL, FUEN, UEA, aliaj).

Fikso de propono de laborplano, inkluzive de indiko pri tio, kiuj esploros kaj kiu(j) gvidos/kunordigos kaj inkluzive de propono pri esplordemandoj.

Forsendo de la plano (propono) al diversaj NGOj, institucioj/instancoj/personoj.

Ellaboro de respondoj.

Dua versio de la laborplano; refoje forsendado al ĉiuj, kiuj intertempe apartenas al la reto.

Fiksado de la definitiva dokumento kaj forsendado al la *NGO grouping* "homaj rajtoj", kiu sendu la dokumenton al la asembleo de KdE.

3 - K o n d i ĉ o j

Estu dokumento de diversaj NGOj kaj aliaj organizoj/institucioj/instancoj.

Ni petu tiujn instancojn, kiuj havas sperton pri la temo. Ni petu kelkajn universitatojn kompili la dokumenton por ke ni akiru objektivan raporton. Ili havu sperton pri homaj rajtoj kaj lingvo-politiko. Ni proponas universitatojn en la landoj Germanio, Francio, Nederlando kaj Britio. Ni listigos ĉiujn instancojn kaj personojn en anekso.

Ĉiuj stadioj de la dokumento ricevos numeron.

Hans Erasmus
Voorburg, 15-10-2001
Laan van Oostenburg 402271 AP Voorburg
tel. +31 703863529
erasmusz@worldonline.nl

EŬROPA DEBATO

Estas verŝajne ke en la Eŭropa "supro-kunveno" okazonta jarfine en Laeken (Belgio) oni decidis starigi konvencion konsistantan el reprezentantoj de la eŭropa parlamento, de la naciaj parlamentoj de la Eŭrolandoj, de la Eŭropa Komisiono kaj de la naciaj registaroj, por pritrakti la problemojn ligitajn al plua evoluo de la Unio kaj doni indikojn al la registaroj.

Prepare al tiu konvencio okazos renkontiĝoj kun la reprezentantoj de la "civila socio", kiuj esprimos siajn vidpunktojn.

Prepare al tio la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado organizas serion de renkontiĝoj kun diversaj asocioj. Unu el tiuj okazis la 4an de novembro 2001 en Marina di Massa, ĉe la Tirena Marbordo de Norda Toskanio, kune aranĝita de CIME (Itala Konsilio de la Eŭropa Movado) kaj de Itala Esperanto-Federacio

*La temo estis **La civila socio al la eŭropa federacia konstitucio - Eŭropa Identeco kaj lingva demokratio**. Prelegis Ugo Ferruta, membro de la plenuma komitato de la Eŭropa Movado (internacia), Enrico Ferri, membro de la Eŭropa Parlamento kaj urbestro de Pontremoli kaj Umberto Broccatelli, prezidanto de EEU.*

Gvidis Giordano Formizzi, eksa prezidanto de IEF. Ĉeestis sesdeko da personoj. Sekvis intensa debato. Jen la teksto de la referaĵo de Umberto Broccatelli.

Post la 11a de septembro 2001 la mondo ne plu estas sama kiel antaŭe. Usono estis unufoje atakita sur sia teritorio. La eŭropaj landoj esprimis sian solidarecon, sed ankoraŭfoje aperis klara la foresto de Eŭropo mem sur la monda scenejo. La unuopaj eŭropaj landoj estas petataj kontribui en la respondo de Usono, ankaŭ je militista nivelo, sed la veraj decidoj, kiel ĉiam, estas farataj de Usono.

Ripetiĝas, sed je pli vasta skalo kaj en tre pli danĝera situacio, tio kio jam okazis en Balkanio. Oni povintus supozeble atendi ke, ĉe tiu ĉi situacio, en la diskutoj kaj en la politikaj elpaŝoj okazintaj en la semajnoj sekvintaj la tragedion de la Ĝemelaj Turoj, iu inter la politikaj responsuloj de la diversaj eŭropaj naciaj registaroj rimarkigus la malfortecon kaj la senpovecon de Eŭropo, ĝian necese subordigitan pozicion, kaj energie surtabligus la nepran neceson doni voĉon al Eŭropo, doni al ĝi veran kapablon de politika agado en la monda kadro, sed tio apenaŭ okazis. Iu diris: nun estas pli urĝaj aferoj, pri Eŭropo ni zorgos poste.

Post la disfalo de Sovetunio, Usono restis la sola monda superpotenco kaj tiu kondiĉo "kondamnas" ĝin

vole-nevole roli kiel “mondpolicisto”. Rimarkeblas la manko de alia voĉo, de alia granda potenco demokratia, jes amika de Usono, sed egalranga al ĝi, kiu povus sentigi sian pezon en la grandaj decidoj kaj surpreni siajn respondecojn. Sed Usono estas granda federacia ŝtato. Ĉirkaŭ ĝia flago kolektiĝas kun fiereco ĝiaj civitanoj. La Eŭropanoj ekmarŝis sur la vojo de la unuiĝo malgrandpaŝe, ankoraŭ ne trovinte la kuraĝon fari la grandan transsalton, de la ŝtatoj-nacioj al la federacia ŝtato. De federacia ŝtato la Unio havas unu karakterizon: la ununuran monunuon, kiu estas sendube granda celo atingita. Sed la ununuran monunuon ne akompanas ununura regado de la ekonomio kaj tio elmetas ĝin al seriozaj danĝeroj.

Machiavelli diris ke prerogativoj de la princo estas la “monsako” kaj la “glavo”. El la karakterizoj de ŝtato la Unio posedas ja “la monsakon”, t.e. la povon emisii monon, kio estas prerogativo de la “princo”, sed la princo, nome la ŝtato, ankoraŭ ne ekzistas. Mankas krome la alia fundamenta prerogativo de la ŝtato: “la glavo”, t.e. la monopolo pri la rajta uzado de la forto. Mankas la kapablo fari propran politikon eksterlandan kaj defendan. Tial, kiam la eŭropaj landoj troviĝas antaŭ situacioj en kiuj oni devas konfrontiĝi kun aliula perforto, ili estas senpovaj kaj devas konfidi sin al la “granda frato” amerika kaj akcepti ĉi ties decidojn, ĉu ĝustajn ĉu malĝustajn.

En la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento la sovetia minaco donis al la Eŭropanoj la puŝon unuiĝi ankaŭ je militista nivelo kaj oni alvenis tre proksimen al la starigo de la Eŭropa Defendo-Komunumo kaj de la al ĝi kunligita Politika Komunumo. Tio estus signifinta praktike la fondon de la Eŭropa Federacio. Sed en Francio la koalicio de la stalinista maldekstro kun la dekstro de la granda mastraro protektisma sukcesis aktivigi la naciistan reflekson de la Francioj kaj enterigi tiun klopodon. Nun ekzistas nova granda minaco kontraŭ la demokratio, la paco kaj la libereco. Ĉu la Eŭropanoj volos plu konfidi sin al la ombrelo de la onklo Sam? Aŭ ĉu ili ekkonscios pri siaj respondecoj? La eŭropaj civitanoj komprenas la neceson de pli granda unueco, sed la politikistoj ŝajnas nekapablaj meti tiun celon en la tagordon.

La poreŭropaj movadoj lanĉas alvokon por kunvokado de Konstitucifara Asembleo, kiu fondu la Eŭropan Ŝtaton. Se la ŝtatestroj kaj registarestroj almenaŭ de kelkaj el la Uniaj landoj ekkonscios pri la drameco de la situacio kaj malfermos sin al rigardo pri la politiko, kiu eksuperu la butikajn kvereletojn kaj la mallarĝajn naciajn vidpunktojn, tiam malfermiĝos ebleco. Alvoki la eŭropanojn al la balotiloj por elekti konstituci-faran asembleon kaj poste por ratifi la konstitucion, kiun ĝi estos preparinta, tio signifos doni al la Eŭropanoj novan pli grandan patrolandon, kio - kiel diris Luigi Einaudi - ne signifos fornei la naciajn patrolandojn, jam fariĝintajn malgrandaj, sed integri ilin. Tiel la Eŭropanoj vere fariĝos civitanoj de Eŭropo, kiam Eŭropo estos rekonebla en komunaj demokratiaj institucioj kapablaj reprezenti ĝin en la mondo. En Usono oni uzas la vorton “nacio” ankaŭ por indiki la nordamerikan federacion, kiel patrolando de la civitanoj. Ni ne scias, ĉu oni alvenos paroli pri “eŭropa nacio”, sed ĉiukaze estos bezonate formi kaj kreskigi en la Eŭropanoj la senton pri eŭropa identeco. La aparteno al la Unio devos krei la federacian eŭropan identecon, nome patriotismon, lojalecon al plurnacia komunumo ne fermitan kaj ekskluziveman kiel estis la malnovaj ŝtatoj-nacioj, sed malfermitan al ĉiuj, kiu, akceptante ties principojn, volos partopreni en ĝi.

Por ke tio ĉi okazu estas tamen necese ke la Eŭropanoj ne sentu sin dividitaj inter Eŭropanoj de A-kategorio kaj Eŭropanoj de B-kategorio, kiel nuntempe bedaŭrinde okazas.

Foliumante la gazetojn, kiuj en Bruselo aperigas dunganoncojn por oficejoj laborantaj en la kadro de la uniaj institucioj, oni ofte trovas anoncojn kiuj metas kiel kondiĉon por la proponata ofico la karakterizon “denaska anglalingveco”. Nome oni serĉas personojn denaske anglalingvajn, ne simple personojn kiuj bonege sciu la anglan. Se iu ne estas denaska anglalingvano, tiu suferas je netransirebla handikapo. Tio objekte estas diskrimino. Vide al la plilarĝiĝo de la Unio la Eŭropa Komisiono emas altrudi la uzadon de la angla en la landoj de centra-orienta Eŭropo; ĝiaj funkciuloj pli kaj pli uzas la anglan por komuniki kun tiuj ŝtatoj, ĝis devigo je ekskluziva uzado de tiu lingvo en la kadro de iuj agrikulturaj programoj.

Jam nun en la Unio oni emas limigi la nombron de la efektive uzataj laborlingvoj en multaj cirkonstancoj je du aŭ tri. Antaŭ nelonge okazis deklaroj de la ministroj pri eksterlandaj aferoj franca kaj germana kontraŭ la dominantan uzado de la angla. Bedaŭrinde tamen tiuj protestoj ne proponas realan solvon, validan por ĉiuj, sed limigas sin je antaŭenigo de pretendoj favore al tiu aŭ alia lingvo. Se la Unio fariĝos Federacio, ĝi certe ne povos funkcii kun 12 aŭ 20 lingvoj reale egalrajtaj.

Ĉiuj multnaciaj ŝtatoj en la historio havis komunan lingvon, apud la lokaj lingvoj, sed tiam temis pri imperioj, kie la lingvo de la kortego aŭ de la dominantaj popolo estis trudita al la ceteraj popoloj. En la kazo de Eŭropo neniu popolo rajtas pretendi altrudi sian lingvon al la ceteraj. Tamen unu lingvo, la angla, aŭ pli ĝuste la usona, jam estas fakte trudiĝanta sur la ceteraj, kaŭze de la neceso ĉiel havi komunan komunikan lingvon (*lingua franca*) kaj en la ŝajna manko de pli bona alternativo. Tio ĉi tamen kunportas la riskon, aŭ je longa tempo eĉ la certecon, ke la ceteraj lingvoj iom post iom estos derangigitaj al duaklasaj lingvoj, al dialektoj nekapablaj esprimi la pli altnivelajn komunikajn funkciojn, kaj destinitaj je pli longa tempo al malapero. Jam hodiaŭ ni vidas kiel pli kaj pli ofte en paroloj aŭ skriboj itallingvaj uziĝas anglaj vortoj, eĉ kiam ekzistas perfektaj itallingvaj ekvivalentoj.

Sed ĉu vere ne ekzistas alternativo? Ni opinias ke tia alternativo ekzistas: ĝi estas la uzado de planlingvo,

t.e. praktike Esperanto. Tiu lingvo estas plurfoje pli facile lernebla ol iu ajn etna lingvo, kaj aparte ol la angla (kiu prezentas multajn malfacilaĵojn), sed ĉefe ĝi estas neŭtrala kaj avantaĝas neniun. Oni uzadu la anglan en la teknikaj kaj sciencaj kampoj, kie - en la nuntempa situacio - tio estas neevitebla. Sed en la homaj kontaktoj de la ordinaraj personoj oni disvastigu tiun ĉi lingvon kreitan de homo por ĉiuj homoj.

La Eŭropa Federacio povos fari tion kaj havos propran intereson fari tion, pro du kialoj: 1) ĉar la altrudo de unu nacia lingvo super la ceterajn estas ĉiukaze faro diskrimina kaj kontraŭdemokratia, kiu povos esti repuŝajn reagojn; 2) la angla, nome la usona, estas la lingvo de la granda monda potenco, al kiu la Unio volos kaj devos esti amika, sed kun kiu ĝi ne povos identiĝi. La lingvo estas la plej potenca faktoro de nacia identiĝo: **kiel ni povos vere senti nin Eŭropanoj, se ni parolos amerike?** Estas necese ke politikistoj, kleruloj kaj la eŭropaj institucioj alfrontu tiun ĉi problemon sen antaŭjuĝoj kaj komencu pretigi la vojojn por solvi ĝin, starigante la oportunajn sidejojn por pli profunde esplori tiun ĉi temaron. Unu afero dume tuj farebla estus, ekzemple, ekorganizi instruadon de Esperanto al parto de la personaro de la traduk-servoj de la eŭropaj institucioj. Tradukistoj kaj interpretistoj, kiuj jam regas du aŭ tri lingvojn, povus ellerni Esperanton en mallonga tempo kaj poste komenci uzadi ĝin, eksperimente, kiel laborlingvon.

Mi estas eŭropa federisto kaj ankaŭ esperantisto kaj mi trovas ke la du streboj estas profunde interligitaj. Esperanto havos malmultajn ŝancojn de sukceso, se ne ekzistos Eŭropa Federacio, sed la Eŭropa Federacio havos en si grandan faktoron de malforteco, se ĝi ne estos adekvate solvinta sian lingvo-problemon.

* Ĉu vi aliĝis al la 5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso?

* Ĝi okazos en Verona, en Norda Italio, **23-28 aŭgusto 2002, kun la temo**

* ***Efektiva lingva egaleco: rajto de la Eŭropanoj***

* Organiza Komitato: Verona Esperanto-Grupo, CP 1616, 37100 Verona, Italio

* e-poŝto: esperantoverona@adriacom.it p.ĉ.k. 25673328

* kasisto s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37131 Verona, Italio. (Al la sama poŝta konto oni povas pagi pere de banko al BANCOPOSTA, CIN L, ABI 07601, CAB 11700)

* **Oni povas pagi rekte al la O.K. (per p.ĉ.k. , per ĉeko al la kasisto aŭ per la UEA-konto *salv-i*) aŭ per via Landa Asocio.**

VERONA 2002
5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso
23-28 aŭgusto 2002

ALIĜILO

Familia nomo:

Persona nomo: viro/virino (forstreku unu)

Adreso: (nacilingve, latinlitere)

Lando:

Tel.-n-ro (kun prefikso) Faks-n-ro

e-poŝto:

Aliĝ-kotizoj en eŭroj

La kotizoj diferenciĝas laŭ du landgrupoj:

A) Ĉiuj landoj escepte de tiuj sub B (kat. 1 ordinara kaj 2 reduktita).

B) Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio, escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.; Afriko kaj Latina Ameriko (kat. 3 ord. kaj 4 red.).

Junuloj (ĝis 30-jaraj), kunuloj de kongresanoj kaj handikapuloj pagas reduktitan kotizon.

Por ĉiu aliĝperiodo sekvas la kotizoj laŭ kategorioj en la jena ordo:

1 (Landoj A - Ordinara) / **2** (Landoj A - Reduktita) / **3** (Landoj B - Ordinara) / **4** (Landoj B - Reduktita)

	1	2	3	4	
ĝis 15 okt. 2001	60/	30/	36/	18	eŭroj
ĝis 31 dec. 2001	70/	35/	42/	21	eŭroj
ĝis 31 mar. 2002	80/	40/	48/	24	eŭroj
ĝis 31 maj. 2002	90/	45/	54/	27	eŭroj
poste	100/	50/	60/	30	eŭroj

(Infanoj ĝis 10-jaraj kaj akompanantoj de handikapuloj aliĝas senpage)

Mi pagis eŭrojn por aliĝo en kat.

(ĉe kat. 2 kaj 4 indiku la motivon de la redukto:

junulo - kunulo - handikapulo; forstreku la nevalidajn)

Al la organiza komitato per p.ĉ.k / per ĉeko / kontante / per la UEA-konto **salv-i**

Al mia landa asocio (forstreku la nevalidajn)

Dato Subskribo

Organiza komitato: VERONA ESPERANTO-GRUPO, CP 1616, 37100 VERONA, ITALIO

e-poŝto: <esperantoverona@adriacom.it>

p.ĉ.k. 25673328, je la nomo de la kasisto:

s-ro Sergio Antoniazzi, Via Brigata Casale 1, 37137 Verona, Italio. (Al la sama poŝta konto oni povas pagi ankaŭ pere de banko al BANCOPOSTA, CIN L, ABI 07601, CAB 11700)

Oni povas pagi rekte al la O.K., per p.ĉ.k., per ĉeko al la nomo de la kasisto aŭ per la UEA-konto <salv-i>. Sendu pagon kaj aliĝilon al la sama adreso, kun fotokopio de la pag-atesto.

Vi povas kopii la ĉi-supran aliĝilon, plenigi ĝin kaj sendi ĝin per ordinara poŝto al la **Organiza Komitato: Verona Esperanto-Grupo, CP 1616, 37100 Verona, Italio**

aŭ e-poŝte al <esperantoverona@adriacom.ita>

Se vi pagas al via Landa Asocio, sendu al ĝi vian aliĝilon, sed samtempe bonvolu ankaŭ sendi kopion de ĝi aŭ e-poŝtan sciigon al la Organiza Komitato.